BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO
8-6-1974

CGC Nº
00406 504/0001-06

# Conselho Brasileiro de Esperanto

SEDE PRÓPRIA
Ed. Jockey Club, sala 103
Telefone (061) 226-1298
70.300 - Brasília - DF

PRESIDÊNCIA
Alameda dos Maruás, 471
Telefone (011) 275-1681
04.068 - São Paulo - SP

JAN/FEV/1983 BOLETIM INFORMATIVO Nº 75

## BKE DIVIDAS KONGRESAN MONPROFITON



**En nomo de Laborgrupo Antaŭen, kolonelo Adolpho de Miranda Silva (maldekstre) ricevas ĉekon je valoro de Cr$ 219.670,00, kiun donacis BKE pere de la financa direktoro, s-ro José Carlos Dorini Ramos.**

Dank' al la kunhelpo de esperantistoj, komercistoj, aŭtoritatuloj kaj financaj institucioj, la neta profito de la 3a jarkongreso realigita de nia Organizaĵo en Brazilja, en decembro 1982, estis vere kontentiga.

Laŭ la tradicio, ni kutimas dividi la gajnon kun la institucio, kiu invitis la kongreson kaj prenis sur sin la respondecon zorgi pri ĝia antaŭpreparo. Ĝuste pro tio, la estraro de BKE donacis al Laborgrupo Antaŭen, de Brazilja, la monsumon de Cr$ 219.670,00, ekvivalentan al 50% de la neta rezulto de Cr$ 439.340,00

→ P.2

montrata en la sekvanta kongresa bilanco.

| ENSPEZOJ | |
|---|---|
| Aliĝoj | 140.500,00 |
| Bankaj donacoj | 485.580,00 |
| Komercaj donacoj | 10.000,00 |
| Fotoservo | 10.000,00 |
| Hotelrezervoj | 11.500,00 |
| Bankedo-kotizoj | 57.000,00 |
| Bazaro | 5.210,00 |
| | 719.790,00 |

| ELSPEZOJ | |
|---|---|
| Presaĵoj | 26.000,00 |
| Bankedo-kosto | 68.610,00 |
| Hotelantaŭpagoj | 11.500,00 |
| Luo de teatro | 60.000,00 |
| Luo de projekciilo | 10.000,00 |
| Teatro-trupo el Rio | 89.460,00 |
| Transporto | 5.000,00 |
| Materialo | 9.880,00 |
| | 280.450,00 |
| Neta Profito | 439.340,00 |
| | 719.790,00 |

Estas oportune klarigi, ke la supra bilanco ne registras ciferon proksimuman al Cr$ 200.000,00, rilatan al ekspedado de cirkuleroj, afiŝoj, aliĝiloj kaj plastaj tekoj al kongresaliĝintoj, kiuj ne povis ĉeesti la eventon. Tian elspezon (verdire nerektan subvencion) faris por BKE diversaj fakaj departementoj el la registara administracio en Brazilja, dank'al kleraj kaj komprenemaj amikoj kiujn ni havas tie.

Resume, la lasta jarkongreso de BKE estis pli profitdona ol optimisme esperis nia financa direktoro, kiu estas ridetanta ĝis hodiaŭ. Dio estu laŭdata!

Casc


**BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO**

Honora Prezidanto

Francisco de Souza Almada, Av. Bern. de Campos 624, Ap. 72, BR 11100 - Santos-SP

**Estraro**

**Prezidanto:** Carlos A. S. da Cunha, Alameda dos Maruás 471, Planalto Paulista, BR 04.068, São Paulo - SP

**Vicprezidanto:** Nelson P. de Souza, Caixa Postal 07-1182, BR 70000 - Brasília - DF

**Kasisto:** José Carlos Dorini Ramos - SHIN QI 02 - Cj. 08, casa 15 BR 71500 - Brasília - DF

**Sekretario:** F-ino Lêda da Silva Gama, SQS 306-A 101, BR 70353 - Brasília - DF

**Kulturaj Aferoj:** Walter A. Francini, Rua Afonso Bandeira de Melo, 35, Campo Belo, BR 04613, São Paulo - SP

**Informa Bulteno**

Oficiala organo planita por monata apero.
Dissendo senpaga

**RESPONDECAJ DIREKTOROJ:** Carlos A. S. Cunha, Nelson P. de Souza kaj Walter Francini

Kunlaboraĵoj intelektaj estas bonvenaj. La estraro, tamen, ne respondecas pri subskribitaj artikoloj.


## LA IIIª KONGRESO STATISTIKE

Pirarbo

Estis entute 159 aliĝintoj el 11 ŝtataoj. Inter tiuj estis 76 de Brazillio, 37 de Rio-de-Ĵaneiro, 17 de San-Paŭlo, 8 de Goiás, 6 de Minas Gerais, po 4 de Pernambuco kaj R.G. Sul, 3 de Santa Catarina, 2 de Bahia, po 1 de Paraná kaj Ceará. Ne ĉeestis 43, al kiuj ni sendis per poŝto materialon. El la 159 aliĝintoj estis 83 viroj, 44 virinoj, 25 gejunuloj kaj 7 infanoj.

Kvankam la farita esploro ne povas montri la definitivan tendencon de la brazila esperantistaro, eble estas utile noti - por la organizado de estontaj eventoj - ke laŭ la proponitaj kunsidoj montriĝis interesiĝo jene: 47 por E-instruado, 46 por Spiritismo kaj 26 por Junularaj Aferoj. En dua grado aperas: 12 por Radioamatoroj, po 8 por Skoltoj kaj Filatelio, 7 por Katolikoj. Fine, oni registris ankaŭ: 3 por Turismo, 2 por Filozofio, kaj po 1 por Ŝako, Psikologio, Ufologio, Astronomio kaj Literaturo.

**BULTENOJ PERDITAJ**

Kolektanto de BKE-Bultenoj perdis la numerojn 28 kaj 31 (jaro 1977) kaj n-ron 50 (jaro 1980). Se lu leganto povas disponigi ilin, bonvolu sendi al zorgo de nia Prezidanto, en São Paulo.

## FRANCISCO ALVES MATA

La radiamatoroj ne plu aŭdos el Maceió (Al) la alvokon de la kolego PP 7 IY, MATA, kiu forlasis nin la 3an de januaro 1983, pro infarkto de la miokardio, en la sama tago kiam li festus sian 78-datrevenon.

Kolonelo Francisco Alves Mata decidis lerni E komence de 1969, post iom da rezisto, persvadita de la karmemora inĝeniero D-ro Nid Dutra d'Amorim (PY 6 JZ, NID), kiu mortis antaŭ 4 jaroj, en la sama tago de la forpaso de samideano Mata. Stranga koincido, ĉu ne?

Laŭ informoj de D-ro Enivaldo Alves Silva, "Kolonelo Mata estis la iniciantinto de perradia kurso de Esperanto en la regiono Alagoas, en februaro 1969. Krom la aktivado en la radiamatora medio, Francisco Alves Mata ankaŭ partoprenis en la ĝenerala movado, influis kaj anteŭen puŝis ĝin en sia regiono. Gravajn atingojn li sukcesis dum la senĉesa poresperanta laborado, kiel rezolucion de la Kultur-Konsilio de Alagoas favore al enkonduko de instruado de E en mezgradaj lernejoj. Influhava persono en la ŝtato Alagoas, kolonelo Mata okupis plej diversajn gravajn postenojn, kiel oficiro, administranto, ĵurnalisto, verkisto, poeto, instruisto, beletra akademiano kaj radiamatoro".

Okaze de la 66a UK, li venigis en nian ĉefurbon la nordorientan folkloran trupon "Pastoralo", apartenantan al la Federacia Universitato de Alagoas. Tiun trupon konsistigis 25 ĉarmaj studentinoj, kiuj brile rolis dum la kongresa spektaklo nomita Brazila Vespero.

Samideano Alves Mata estis delegito de UEA ĝis 1981, delegito kaj individua membro n-ro 123 de nia Asocio, kaj partoprenis ankaŭ la membraron de la Internacia Ligo de Esperantistaj Radio-Amatoroj (ILERA).

La estraro de BKE, per tiu ĉi nekrologo, prezentas siajn kondolencojn al la konsternita familio de la mortinto kaj preĝas por ke li ripozu en paco kaj Dio gardu lian animon.

## INSTRUISTOJ KUNVENAS

Instruistoj de iu ajn lernobjekto devas periode kunveni inter si por interŝanĝo de ideoj kaj spertoj pri metodoj kaj lernolibroj. Tio kompreneble validas ankaŭ por la instruistoj de Esperanto.

Vide al tio, Esperanto-Asocio de San-Paŭlo kunvenigis en sia sidejo la 20-an de Februaro, de la 9-a ĝis la 12-a, instruistojn ĉe asocioj aŭ grupoj en Santos, Sorocaba, São Miguel Paulista, Penha kaj ĉe la Asocio mem. Ĉeestis ankaŭ la prezidanto de BKE, s-ro Carlos A.S. da Cunha.

El la debato evidentiĝis ke la rekta metodo, kvankam pli laboriga por la instruistoj, prezentas pli da avantaĝoj ol la tradiciaj metodoj. Kompreneble la instruistoj, kiuj preferas, restas liberaj por uzi tradiciajn metodojn.

Krome, por konstantigi la rilatojn inter la instruistoj kaj igi pli imponaj la solenojn, la reprezentantoj de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo, Esperanta Klubo Zamenhof (el São Miguel) kaj Esperanta Grupo Bezerra de Menezes (Penha) decidis organizi komunajn festojn por la livero de diplomoj al siaj kursfinintoj.

WAF

---

## KAMPANJO POR ATINGO DE 250 INDIVIDUAJ MEMBROJ

Kun granda plezuro ni informas, ke multaj esperantistoj - inter ili kelkaj mondfamaj pro sia erudicio - lastatempe aniĝis al nia Asocio, kio certigas nin, ke la supra kampanjo atingos sian celon pli frue ol ni esperis. Al la subaj novaj individuaj membroj, nian koran dankon pro la helpo kaj fido je nia poresperanta laboro:

Antonio de Souza Barbosa - RJ; Robinson Mattos - AM; George Otto Vaske - RS; Leopoldo Henrique Knoedt - BA; D-ro Edmundo Villa Verde - RJ; Amarílio H. Carvalho - RJ; Prof-ro Geraldo Matos - PR; D-ro Evaldo Pauli - SC; Raymundo Xavier de Menezes - DF; Laércio Klippel - RJ; Benedito de Paula - SP; Renato Frezatte - SP; D-ro Enivaldo Alves Silva - DF; D-ro Roberto Vieira Resende - DF; D-ro Hélio F. Aderne - MG; Cleber Moraes Lemos - RJ; Augusto Ribeiro - DF; Sônia Maria Vieira Ribeiro - DF; Denise Arneiro Deslandes - RJ; Dalmo Soares Arantes - MG.

La membraro de BKE konsistas nun el 176 individuaj membroj kaj 30 diversaj Asocioj dissemitaj en pluraj ŝtatoj de la lando.



# TRA LA MONDO

**EKOLOGIO**

● Tutmonda Unio por Vivprotektado, kun sidejo en Aŭstrio (Postfach 6, A-5033 Salzburg), decidis ekuzi ankaŭ Esperanton en siaj internaciaj rilatoj. Temas pri internacia organizaĵo "por la protekto de la naturo, pejzaĝo, animala kaj homa vivo". Ĝi havas filiojn kaj reprezentantojn en 27 eŭropaj, aziaj kaj amerikaj landoj (Rev. Esperanto, dec/82).

**PRI LA HISTORIO DE UEA**

● Dum la venonta UK (Budapeŝto, julio 30 ĝis aŭgusto 08), UEA planas revivigi publikan demandokonkurson, kiu jam okazis en antaŭaj kongresoj. Ĉi-foje la programo traktos nur unu temon - la 75-jaran historion de UEA. Kandidatoj por la konkurso skribu al la konstanta adreso de la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

**ESPERANTO-TURISMO**

● Por la unua fojo venis oficialaj reprezentantoj de grandaj neesperantistaj vojaĝoficejoj al la VIII-Internacia Foiro de E-Turismo okazinta en Pollando (Torun, Bydgoszcz, Varsovio). Ĉiujare esta eldonata Turisma E-Kalendaro, kun preskaŭ 400 internaciaj aranĝoj en ĉirkaŭ 20 landoj. Interesitoj sin turnu al ESPERANTOTUR - Str. M. Sklodowskiej-Curie 10-PL 85-094, Bydogoszcz - Pollando.

**MONDA ĴAMBOREO**

● Diversaj E-periodaĵoj, inkluzive "Esperanto" kaj "Heroldo", raportas pri tio, ke dank' al anonima donaco Skolta Esperanto-Ligo lanĉis konkurson kun premioj je 200 kanadaj dolaroj por ĉiu el la 25 skoltoj aŭ estroj, kiuj plej bone kapablos paroli Esperanton dum la Monda Ĵamboreo - julio/83, en Kanado. Detalojn sendos P. RONALD - 45, 10th Ave. - Roxboro, QUEBEC H8Y 2N3 - Kanado.

**800-JARA DATREVENO DE SANKTA FRANCISKO EL ASIZO**

● Itala E-Centro lanĉis 100 mil bildkartojn kun kvar famaj tekstoj esperantlingvaj: Kantiko de la Kreitaĵo, Beno, Simpla Preĝo kaj Patro Nia. Paketojn kun 20 kartoj (kostas 2.500 lirojn) petu al Albino Ciccanti - Vc.S. Bernardino 26, I-47037 Rimini - Italujo.

**PRI LA SANKTA BIBLIO**

● La ilustrita revuo Espero Katolika, de decembro lasta, informas ke "ekde 1973, severegaj leĝoj malpermesas al la loĝantoj de Nepalo praktiki religiojn diversajn ol tiun ŝtatan. Legado de Biblio estas krimo. Sola escepto estas farata por la eksterlandanoj, kiuj rajtas praktiki sian religion, kondiĉe ke ili ne propagandu ĝin".

● Tute male, informas la sama revuo, "Biblio daŭre furoras en multaj landoj de la mondo, eĉ en Japanio, kie, fronte al nuraj 411.000 katolikoj oficiale listigitaj, ĉiujare vendiĝas du milionoj da Biblioj aŭ da bibliaj elĉerpaĵoj, fare de pli ol mil librovendejoj tra la tuta lando. Oni kalkulas, ke 30 milionoj da japanoj posedas Biblion. Tio konsistigas surprizan fakton, des pli se oni konsideras, ke ĝi ne tradukiĝas en adekvatan nombron da baptoj".

**ODONTOLOGIO EN LA EVOLUANTAJ LANDOJ**

● La evoluantaj landoj faras grandan kontribuon en kunlaboro al la monda odontolgio. Ili reprezentas proksimune la duonon de odontologoj en la mondo (nur Brazilo havas 70 mil dentkuracistojn). Tiuj landoj esploras novajn alternativojn por solvi la problemojn de la altegaj spezoj por la dentkuracado, uzante simpligitajn ekipaĵojn kaj procedojn. Ĉefe Brazilo, Meksikio, Kubo ktp. volas solvi tiun problemon, informis al ni d-ro Roberto Resende (Caixa Postal 04-0222, BR 70.312 - Brasília-DF), repondeculo por la tria mondo de la Dentista Sekcio de UMEA.

**BKE - JARKOTIZO 1983**

Multaj anoj ankoraŭ ne renovigis siajn jarkotizojn por 1983. Al ili, kaj al ĉiuj kiuj deziras aliĝi al nia Asocio, bonvolu sendi tuj la koncernan sumon de Cr$ 2.000,00, rekte kaj favore al Conselho Brasileiro de Esperanto, en Brazilja. Novaj membroj, samtempe kun la pago, devas informi tutan nomon, naskiĝdaton, sekson, civilan staton kaj kompletan adreson.

## GUTOJ GRAMATIKAJ . . .

### REFLEKSIVA PRONOMO "SI"

El la gramatiko por progresintoj, "La Tuta Esperanto", de Henrik Seppik (Eldonis Literatura Mondo, Budapest) oni prenis jenan lecionon:

"Kiam la ago celas la saman personon, kiu ĝin plenumas, t.e. kiam tiu, kiu estas subjekto, samtempe estas ankaŭ objekto, oni uzas refleksivan pronomon. Por la unua kaj dua persono speciala formo de refleksive pronomo ne ekzistas, sed oni ripetas la personan pronomon, same kiel en multaj aliaj lingvoj: Mi amas min. Ni gardu nin! Vi trompas vin mem.

Por la tria persono (li, ŝi, ĝi) kaj por "oni" la refleksiva pronomo estas "si": Li lavis sin per malvarma akvo. Ŝi rigardis sin en spegulo. Tie ĉi oni povas bani sin. La profesoro forgesis siajn galoŝojn en la teatro. La hundo amas sian mastron.

Por la unua kaj dua persono "si" uzebla ne estas. Do neniam "ni lavis sin" aŭ simile, sed "ni lavis nin".

Estas granda diferenco inter la frazoj "Li prenis la horloĝon el sia poŝo" kaj "Li prenis la horloĝon el lia (aŭ ŝia) poŝo". En la unua okazo la pronomo (sia) rilatas al la subjekto (t.e. li prenis la horloĝon el sia propra poŝo), dum "lia" montras, ke li prenis la horloĝon el fremda poŝo. Do, por konservi sian bonan nomon kaj eviti malagrablaĵojn kun polico, oni devas bone diferencigi inter sia, lia aŭ ŝia poŝo!

"Si", "sin" kaj "sia" devas rilati ĉiam al la subjekto de la sama frazo, kie ili troviĝas. Bedaŭrinde pro influo de naciaj lingvoj, kie oni ne diferencigas inter "sia" kaj "lia", kelkaj trouzas ilin kaj diras ekzemple "Li diris, ke sia patro estas malsana", kiam fakte tute ne temas pri refleksiva pronomo kaj devas esti "Li diris, ke lia patro estas malsana", ĉar "lia" rilatas ja ne al subjekto de la sama frazo (patro), sed al la subjekto de tute alia frazo (li diris)!

Kelkaj uzas "si" ankaŭ en reciproka senco: "Ili batis sin". Sed tio estas erara, ĉar fakte "ili batis sin" signifas, ke ĉiu el ili batis sin mem! La ĝustaj formoj estas: "Ili batis unu la alian" aŭ "Ili batis sin reciproke". "La gefianĉoj amas unu la alian" — "La gefianĉoj amas sin reciproke".

En la esprimoj singarda, sinmortigo, siatempe, siavice k.t.p., "si" estas neŝanĝebla, egale, al kiu persono ĝi rilatas: "Ni devas esti singardaj" (ne "ningardaj")! "Mi pensis kelkfoje pri sinmortigo" (ne "minmortigo"). "Siatempe (ne "viatempe") vi havis tute alian opinion".

## MONDONACOJ POR LA BULTENO

Dum la lastaj monatoj ĝis la 20a de februaro envenis nian kason kontribuaĵoj de diversaj samideanoj, kiujn ni dankas, nome:

| | | |
|---|---|---|
| Godofredo de Araújo Goes . . . | Cr$ | 800,00 |
| Luis A.P. Menechino . . . . . . . | | 960,00 |
| Elísio da Rocha Dórea . . . . . . | | 800,00 |
| Leopoldo Henrique Knoedt . . . | | 800,00 |
| Edmundo Villa Verde . . . . . . | | 800,00 |
| Jorge Soares das Neves . . . . . . | | 800,00 |
| Antônio R. da Silva . . . . . . . | | 1.000,00 |
| Ivon Barbosa . . . . . . . . . . . | | 300,00 |
| Laércio Klippel . . . . . . . . . . | | 2.000,00 |
| José Martins Coelho . . . . . . . | | 800,00 |
| Francisco R.de M. Sobrinho . . | | 300,00 |
| Nestor Lelis . . . . . . . . . . . | | 400,00 |
| Eneida A. Santos . . . . . . . . . | | 500,00 |
| Cláudio Zimmermann . . . . . . | | 1.500,00 |
| Francisco S. Almada . . . . . . . | | 1.500,00 |
| Lauro J. de Oliveira . . . . . . . | | 80,00 |
| Seraphim Guedes . . . . . . . . . | | 680,00 |
| Roberto Vieira Resende . . . . . | | 1.000,00 |
| Cícero Barros Pimentel . . . . . | | 1.000,00 |

### ATENÇÃO

Este aviso se destina a pessoas interessadas no estudo do Esperanto, mas residentes em cidades ainda não assistidas por professores do idioma. Se você se enquadra nessa situação, sugerimos tomar curso por correspondência, que inúmeras entidades brasileiras propiciam a seus sócios, entre as quais podemos citar a LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO (Praça da República 54, 2º andar, fone: 232-6309, CEP 20.211 - Rio de Janeiro-RJ) e a ASSOCIAÇÃO PAULISTA DE ESPERANTO (Rua Faustolo, 124, fone: 62-1183, CEP 05.041, São Paulo-SP).

Os cursos e as anuidades sociais têm preços módicos. Confiram, pedindo informações por carta ou telefone.

### KOTIZOJ DE U.E.A. POR 1983

La aliĝoj al UEA por 1983 devas esti sendataj al Brazila Esperanto-Ligo aŭ al Kultura Kooperativo de Esperantistoj.

La ĉefdelegito Giuseppe Grattapaglia, kiu restos en sia ofico nur ĝis la Kongreso en Budapeŝto, petas la membrojn ne sendi al li kotizojn, kiujn li ne povos transpagi al UEA.



## BRAZILAJ NOVAĴOJ

**FEDERACIA DISTRIKTO**

● En la urbocentro de Brazilja, nia sidejo daŭras je la dispono de kiu ajn E-organizaĵo, por tie okazigi senpage kunsidojn, ekspoziciojn, prelegojn, esperanto-kursojn ktp. Sufiĉas nur pruntpreni la ŝlosilon.

● Oni aprobis en la lasta estrarkunsido de BKE (01-02-83): la starigon de Esperanta Biblioteko; la aliĝon al UEA, sen pretendo al peranteco; donaci al Laborgrupo Antaŭen la monsumon de Cr$ 219.670,00, pro ties laboro en la organizado de la III-BKE-kongreso; okazigi en Nordoriento la IV-an kongreson, preferinde inter la 2a ĝis la 6a de novembro 1983; eldonigi portugallingve informan broŝuron pri Esperanto, cele al propagando kaj enkonduko de la Lingvo en superajn lernejojn kaj aliajn mediojn, laŭ sugesto prezentita de Esperantista Asocio de Santa Catarina - EASC.

**BAHIA**

● Komence de februaro, en la urbo Jequié, 250 kilometrojn for de la ŝtata ĉefurbo, estis instalita la unua filio de la organizaĵo Esperanto Studgrupo Zamenhof, kun sidejo en Salvador. S-ano José Adson de Almeida respondecos pri elementa kurso de esperanto starigota en marto, kies unuajn lecionojn instruos nia delegito, s-ro José Saraiva Matos. La nova filio kaj esperanto-kurso funkcios en la Spiritisma Centro Bezerra de Menezes, dank'al akcepto de la direktorino Prof-ino Marineide Duarte kaj ceteraj estraranoj de la Centro. (Praça Prof. Antônio Brito s/n - BR 45200 - Jequié).

**GOIÁS**

● Laŭ anoncite en tiu ĉi Bulteno (n-ro 73), estis konfirmita de d-rino Flora Szabó-Felso, en la lasta raporto pri estrarkunsido de UEA, ke d-ro Victor Sadler, Ĝenerala Direktoro de la Centra Oficejo en Roterdamo, post pli ol 20-jara laboro tie, foriros kaj translokiĝos al Fazenda Bona Espero (BR 77.260-Alto Paraíso), kie jam antaŭlonge aktivas la geedzoj Grattapaglia, cele al plibonigo de la kulturo kaj sociaj kondiĉoj de la loĝantaro de la regiono, krom instruado kaj superrigardo de E-movado en nia lando. Estu bonvena, d-ro Sadler!

**MINAS GERAIS**

● Grupo Esperanto e Paz, el Belo Horizonte (Av. Cândio Lucio 420) lanĉis belan glumarkon por memorigi kaj propagandi la unuan jarcenton de Esperanto, em 1987. Ĉu ĝi estus pionira eldonaĵo inter ni?

● Kiel anoncite, Ouro Preto estos la sidejo de la XVI-a Brazila Seminario de Esperanto, en julio venonta. Kontraŭ pago de Cr$ 2.000,00 vi povas aliĝi rekte ĉe Kultura Kooperativo de Esperantistoj, Caixa Postal 1887 - BR 20.031 - Rio de Janeiro, kiu estas la tradicia respondeca subtenanto de la Seminario.

**RIO DE JANEIRO**

● Tutlandan enketon pri la nuna stato de la movado kaj fondebleco de Esperanto-federacio faris samideano d-ro Jorge Soares das Neves (Rua Barata Ribeiro 727/107, BR 22051 - Copacabana). Pri la iniciato, la redakcio aŭdis diversajn klerajn, respondecajn esperantistojn kaj kelkiuj opiniis, ke estas maloportuna la momento por tia esploro, des pli kiam la nunaj prezidantoj de BEL, KKE kaj BKE provas ekfunciigi la Nacian Esperanto-Komisionon kreitan dum ĝenerala asembleo de la esperantistaro, kadre de la XV-Seminario de Esperanto, okazinta en Uberlândia, en julio 1982.

● Fundação Getulio Vargas, Brazila Esperanto-Ligo Kaj SONOVISO lanĉis la 23an de februaro la plej novan verkon de Sylla Chaves, titolitan "Kio estas Esperanto?". Ĝi konsistas el ilustrita, informa kaj instrua afiŝo, konvene faldita por enteni diskon, kiu paralele sonripetas dialogojn kaj kantojn presitajn sur la afiŝo. Laŭ la aŭtoro, per tiu materialo oni havas rapidan prezentadon de la Lingvo kaj de la ĉefaj faktoj pri ĝia uzado en la nuntempa mondo. La verko estas altkvalita, kaj ĉiu esperantisto nepre aĉetu du: unu por si mem, kaj alian por donaci al persono, kies esperantistiĝo povus alporti grandan kontribuon al la movado.

● BEL kaj KKE informas, ke la kotiztabelo de UEA por 1983 validos senŝanĝe ĝis la 31a de marto, jene: MJ - Cr$ 1.600,00; MA - Cr$ ... 4.000,00; - DM - Cr$ 100 mil. Tiuj prezoj inkluzivas peranto-maklerajôn kaj transpagkoston en Roterdamo.

**SÃO PAULO**

● Esperanta Klubo Zamenhof, de São Miguel Paulista, la 21an de januaro solene festis sian 34-an fonddatrevenon. Ĉeestis la eventon la prezidanto de BKE kaj pluraj gesamideanoj, inter kiuj Prof-ino Elvira Fontes, D-ro Walter Francini, kiuj paroladis kaj gratulis la ĉefajn gvidantojn de tiu Klubo, nome s-rojn Genildo Martins Coelho, José Martins Coelho kaj d-ro Oswaldo Pires de Holanda.

● Esperanto-Asocio de San-Paŭlo okazigos en Jundiaí, en la 30a de aprilo kaj unua de majo, sian 9an Regionan Renkontiĝon. Aliĝkotizo kostos Cr$ 1.000,00 ĝis la 31a de marto, post tiu dato 50% estos postulataj kiel krompago.

● En artikolo publikigita de gazeto Nova Era, el la urbo Franca-SP (15-10-82), samideano Cícero Pimentel lanĉis sugeston al UEA, por ke ĝi oficialigu, se ankoraŭ tio ĉi ne okazis, la unuan tagon de septembro kiel "Tagon de la Es-

peranta Gazetaro", omaĝe al la pioniro Leopoldo Einstein, kiu fondis en tiu dato, en 1889, la unuan E-revuon en Nuremberg.

● La 27an de februaro, Sorokaba Esperanto Klubo okazigis la Unuan Esperantistan Kunvenon de la Regiono de Sorocaba, kiel fermon de la Semajno de la Amikeco Internacia, kiu estis motivo de klariga parolado de s-ro Manoel Blaz Garcia. Dum la tuttaga kunveno okazis diskuto pri instrumetodoj, propagando, formoj de varbado, krom filmprezentado, bildkarta ekzpozicio kaj vendado de esperantaj verkoj. Multaj esperantistoj for kaj el la regiono prestiĝis la renkontiĝon, nome: Sylla Chaves, Elvira Fontes, Fanny L. Dupré, Francisca Martos, Agostinho Rodrigues, Max Victor Egon Ramm, Ângela Maria Florêncio, Afonso Celso, Carlos Cunha, José Carlos Dorini Ramos, kaj multaj aliaj kies nomojn oni ne sukcesis registri. Mankas ankoraŭ raporti, ke bongusta kunfratiĝa tagmanĝo plezurigis la kunvenintojn, dank' al ĝentila zorgado de la gastigantoj, d-ro Eluizio Bueno Rodrigues kaj lia ĉarma edzino.

● Prof-ro Euclides Carneiro da Silva, poligloto, poeto kaj prezidanto de Associação Mogiana de Esperanto (R. Capitão Paulino Freire, 366 BR 08.700 - Mogi das Cruzes) instruas Esperanton al diversaj internuloj kaj pastroj en la Seminario de tiu sama urbo.

● Nia kara honora prezidanto, Prof-ro F. S. Almada, malgraŭ sia nuna aĝo - en januaro li festis sian 85an naskiĝdatrevenon - ankoraŭ kuraĝas organizi E-kursojn por instrui komencantojn. Ju pli da tiaj imitindaj ekzemploj, des pli oni venas al konkludo, ke Esperanto junigas la homojn, korpe kaj mense. Jen la nova hejmadreso de la geedzoj Almada: Avenida Bernardino de Campos 624, ap. 72 - BR 11100 - Santos.

## ĈU VI KAPABLAS RIDI?




### I
### MEMORLIBRO

Du frivolaj junulinoj parolas pri siaj amaventuroj. Unu demandas:

— Kial vi ne skribas taglibron?

— Ba! Pri la tago mi havas malmulte por raporti.

### II

Juna naivulino devas unuafoje plenskribi hotelslipon. Ĉe la rubriko "sekso" ŝi skribas: blonda, kaj ĉe la rubriko "edzeca stato" ŝi deklaras: du fojojn ĉiusemajne.

### III

Juĝisto: — Kion vi faris per la ŝtelitaj 2.000 steloj?

Akuzito: — Mi kuŝis kun Linda.

Juĝisto: — Vi mensogas. Linda postulas nur 1.250 stelojn.

### IV

Viro plendas ĉe kuracisto, ke lia edzino ne havas infanojn.

— La plej bona rimedo estas restado en la banurbo Fontoreĝa.

— Sinjoro doktoro, ni estis ses semajnojn tie, kaj tio ne efikis.

— Kompreneble, se ankaŭ vi mem estis tie . . .

### V

Pastro postulis, ke Lizandro konfesu al li sian plej ĉefan pekon. "Ĉu vi aŭ la dioj ordonas al mi malkovri mian animon? demandis Lizandro. "La dioj ordonas al vi!" diris la pastro. "Bone", rediris Lizandro; "foriru de tie ĉi, kaj kiam la dioj min demandos, mi respondos al ili".

### VI
### NEANTAŬVIDITA RESPONDO

Unu provincano, veninte Romon, turnis al si la atenton de ĉiuj per frapanta simileco kun la imperiestro Aŭgusto. Tiu ĉi ordonis, ke oni alkonduku al li la similulon kaj, rigardante lin atente, li diris: "Junulo, ĉu via patrino neniam estis en Romo?" — "Ne, sinjoro", respondis la provincano, "sed mia patro ofte tie ĉi estadis".

*Redakcia noto: I ĝis IV, el la libro "Kruko kaj Baniko el Bervalo", de Louis Beaucaire; V kaj VI, el "Fundamenta Krestomatio", de Zamenhof.*

# CONSELHO BRASILEIRO DE ESPERANTO

TESOURARIA
Caixa Postal 13-2088 - Fone: 243-5486
70.000 - Brasília (DF)

## BALANÇO GERAL

(31.12.82)

### A T I V O

| | | | |
|---|---|---|---|
| **I - Circulante** | | | |
| BANCOS | | | 512.246,73 |
| **II - Realizável a longo prazo** | | | |
| RENDAS A REALIZAR | | | 7.000,00 |
| **III - Permanente** | | | |
| PARTICIPAÇÕES | | 5.000,00 | |
| IMÓVEIS | 320.000,00 | | |
| Correção monetária | 1 720.000,00 | 2.040.000,00 | |
| MÓVEIS E UTENSÍLIOS | 33.200,00 | | |
| Correção monetária | 130.800,00 | 164.000,00 | 2.209.000,00 |
| **IV - Compensado** | | | |
| CONTRATOS DE SEGURO | | | 1.680.000,00 |
| | | | 4.408.246,73 |

=====

### P A S S I V O

| | | |
|---|---|---|
| **I - Patrimônio líquido** | | |
| FUNDO SOCIAL | | |
| -Exercício anterior | 429.942,85 | |
| -Exercício de 1982 (incremento) | 2.244.491,87 | 2.674.434,72 |
| **II - Exigível a curto prazo** | | |
| CONTAS CORRENTES | | 53.812,01 |
| **III - Compensado** | | |
| BENS SEGURADOS | | 1.680.000,00 |
| | | 4.408.246,73 |

=====

---

## DEMONSTRAÇÃO DA CONTA RESULTADO DO EXERCICIO

### D É B I T O

| | |
|---|---|
| DESPESAS COM O BOLETIM INFORMATIVO | 223.665,30 |
| DESPESAS COM A SEDE PRÓPRIA | 119.350,00 |
| DESPESAS GERAIS | 136.517,21 |
| DESPESAS LEGAIS | 5.450,00 |
| 3º CONGRESSO ANUAL BKE - Despesas Diversas | 280.450,00 |
| | 765.432,51 |
| - Superavit transferido para FUNDO SOCIAL | 2.244.491,87 |
| | 3.009.924,38 |

=====

### C R É D I T O

| | |
|---|---|
| CORREÇÃO MONETÁRIA DO ATIVO PERMANENTE | 1.850.800,00 |
| ANUIDADES | 210.000,00 |
| DONATIVOS PARA O BOLETIM | 151.288,00 |
| RECUPERAÇÃO DE DESPESAS | 67.546,38 |
| DONATIVOS PRÓ SEDE PRÓPRIA, RECEBIDOS | 10.500,00 |
| 3º CONGRESSO ANUAL BKE - Receitas Diversas | 719.790,00 |
| | 3.009.924,38 |

=====

Brasília (DF), 31 de dezembro de 1982

Carlos Augusto Siqueira da Cunha
Presidente

José Carlos Dorini Ramos
Tesoureiro

Centro de Cópias Cerqueira Compôs e Imprimiu